WIKIPEDIA

Neneca lingvo

La **neneca lingvo** estas la lingvo parolata de la nenecoj. Apartenas al la samojeda lingvaro kaj sia nombro de parolantoj estas de proksimume 30 000 personoj distribuitaj en vasta teritorio komprenita inter la Kola duoninsulo kaj la rivero Jeniseo, ĉe la rusa arkta marbordo.

Tradicie ĝi dividiĝas je du dialektoj: la "neneca de la tundro" kaj la "neneca de la arbaro"; tamen, pro la nekompreneblo inter ambaŭ, antaŭ nelonge pliiĝis la tendenco diferenci ĉi tiujn du variojn kiel du malsamajn lingvojn. De la du, estas la neneca de tundro kiu havas la plej grandan nombron da parolantoj.

neneca lingvo	
'ненэця' вада / nenetsia' vada '	
Parolata en	Rusio
Parolantoj	31 000
Skribo	cirila alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Urala	
Samojeda	
Norda samojeda	
Neneca	
Lingva statuso	3 sendube endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	mis
ISO 639-3	yrk
Glottolog	nene1249
Angla nomo	Nenets
Franca nomo	nénètse

Enhavo

Historio
Geografia distribuo
Fonologio
Vokaloj
Konsonantoj
Skribo
Vidu ankaŭ
Eksteraj ligiloj

Historio

La nenecoj alvenis al ilia aktuala teritorio dum la unua jarmilo de nia erao. Tiuj de la eŭropa parto estis en intima kontakto kun la komioj kaj, poste, kun la rusoj; dum tiuj de la siberia parto, kun la ĥantoj, mansoj, samojedoj kaj aliaj etnoj, kiuj certe lasis lingvajn pruntojn al ĉi tiu lingvo. Iuj nenecoj translokiĝis al la duoninsulo de Kola dum la 19a jarcento, de kie ili estis elloĝigitaj kaŭze de la atomaj provoj en la sovetia erao.

Nuntempe, post la kolektivigo, la transloĝigo de multaj triboj kaj la aktiva disvolviĝo de la petrola kaj gasa industrio en iliaj teritorioj la tradiciaj moroj de la nenecoj estas minacataj. Tamen, la lingvo ankoraŭ ĝuas relativan bonan uzon, ĉefe inter la nenecoj kiuj vivas en la tundro.

Geografia distribuo

La neneca estas parolata en vasta zono en la nordo de Rusio, kiu enhavas la teritorion de Nenecio kaj Jamalo-Nenecio, samkiel iujn zonojn de la Krasnojarska regiono, Komiio kaj la orientan parton de la Murmanska provinco en la duoninsulo de Kola.

Fonologio

La neneca havas silaban strukturon KV(K); en aliaj vortoj, silabo povas enhavi komencan **k**onsonanton, mezan **v**okalon kaj alternativan finan **k**onsonanton. Ekzemploj estas: ***ya*** (“tero”), ***wada*** (“vorto”) kaj ***ŋarka*** (“granda”). Vokalo *schwa* aŭ mallonga, kelkfoje, povas aperi anstataŭ fina konsonanto. Teorie en ĉi tiu lingvo ne estas vortoj kiuj komencas per vokalo; praktike, ĉi tio kelkfoje okazas en la okcidentaj dialektoj, aparte pro la perdo de la ŋ komenca. Ekzemple, ***arka*** “granda” (en la okcidenta lingvo) por ***ŋarka*** (en la orienta lingvo kaj norma centrala lingvo).

Malgraŭ tio, la silaba strukturo estas sufiĉe kohera en ĉiuj dialektoj: ne ekzistas diftongoj, nek konsonantaj grupoj finaj aŭ komencaj kaj ne ekzistas interaj grupoj de pli ol du konsonantoj.

Vokaloj

Schwa	ə				
Mallongaj	ø				
Mezaj	a	e	i	o	u
Longaj	iː	uː	æ		

Kelkaj dialektoj anstataŭas la *æ* per *e*.

Konsonantoj

Senvoĉaj	k	kʲ / c	p	pʲ	t	tʲ / ʈ
Voĉaj	g	gʲ / ɟ	b	bʲ	d	dʲ
Afrikatoj	ʦ	ʦʲ / ʨ				

Frikativoj	s	sʲ / ɕ	ʒ	ʒʲ / ʑ	
Nazaloj	m	mʲ	n	nʲ / ɲ	ŋ
Likvidoj	l	lʲ / ʎ	r	rʲ	
Duonvokaloj	h	hʲ / ç	w	j	ʔ

La marko ⟨ʲ⟩ indikas palatalizacion aŭ movadon al la palatala artikulacio aŭ la sekundara palatala artikulacio.

Skribo

En la neneca lingvo oni skribas per la cirila alfabeto, kiu enkorpigas la literojn Ӈ, ' y ".

А а	Б б	В в	Г г	Д д	Е е	
а	бе	ве	ге	де	е	ё
З з	И и	Й й	й й	К к	Л л	
зе	и	й		ка	ел	ем
Ӈ ӈ	О о	П п	Р р	С с	Т т	
еӈ	о	пе	ер	ес	те	у
Х х	Ц ц	Ч ч	Ш ш	Щ щ	Ъ ъ	
ха	це	че	ша	ща	ъ	ы
Ь ь	Э э	Ю ю	Я я	'	"	
ь	э	ю	я			

Vidu ankaŭ

- Oficialaj lingvoj en Rusio

Eksteraj ligiloj

- Raportoj de Etnologio (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=yrk)

Oficialaj lingvoj de Rusio	
Tutŝtata oficiala (ŝtata) lingvo	rusa (→)
Lingvoj oficialaj (ŝtataj) en federaciaj subjektoj	abaza · avara · agula · adigea · azerbajĝana · sudaltaja · baŝkira · burjata · dargva · inguŝa · kabarda-ĉerkesa · kalmuta · karaĉaja · komia · kumika · laka · lezga · nogaja · maria · mokŝa · oseta · rutula · tabasarana · tatara · tata · tuva · udmurta · ĥakasa · cahura · ĉeĉena · ĉuvaŝa · erzja · jakuta
Lingvoj kun oficiala statuso	vepsa · dolgana · kazaĥa (→) · karela · komipermjaka · mansa · neneca · selkupa · finna · ĥanta · ĉukĉa · evenka · evena · jukagira

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Neneca_lingvo&oldid=5831734"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 09:31, 23 dec. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.